

Leterkesto, 2-a parto
Claude Gacond, 369-a radioprelego, 1970.11.04 & 07

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni malfermis nian leterkeston kaj ekkonversaciis kun niaj geaŭdantoj. Ni vidis, ke dum la pasintaj monatoj nin salutis geaŭdantoj el Belgio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Francio, Germanioj okcidenta kaj orienta, Hungario, Italio, Jugoslavio, Nederlando, Norvegio, Pollando, Svislando kaj Svedio, do el 15 landoj eŭropaj.

A.- Ni jam respondis al la leteroj kaj poŝtkartoj el Belgio kaj Britio. Laŭ la alfabeto vico, kiun ni elektis por tiu babilado nun alvenas la lando Ĉeĥoslovakio. Sinjoro Jiří Patera skribas :

Cl.- « *Mi ĝojas, ke vi ricevis la organon de Ĉeĥa Esperanto-Asocio **Starto** – mi tute ne sciis, ĉu oni sendas specimenojn al la stacioj, kiuj elsendas esperantlingve. La redakcio mallongigis la fragmenton de via elsendo kaj eĉ en la publikigitaj frazoj ili faris ellasojn, ĝis la senco de tiuj frazoj ŝanĝiĝis. Ekzemple en frazo :*

*A.- Tiu tero, kiun vi repostulas, ne apartenas **nur** al sudetgermanoj...*

Cl.- *Ili forlasis la vorteton **nur** kaj tiamaniere la frazo ricevis tute alian signifon :*

A.- Tiu tero ... ne apartenas al sudetgermanoj...

Cl.- *Estas bedaŭrinde, ke iam tiaj sencoŝanĝaj forlasoj okazas », konkludas nia ĉeĥa aŭdanto. Li pravas. Tiel oni skribas historion. Tiel oni dirigas al tekstoj, kion ili ne diras. Kontraŭ tiaj agoj ni ĉiam sisteme reagos, eĉ se tio ne ĉiam plaĉas al la trafitoj. Tiu manko de honesteco malaltigis la gazeton **Starto**, kaj pruvas, ke ĝi provas unuflanke plaĉi al la ĉeĥa ŝovinismo, kontraŭ la germanlingvaj parolantoj. Tio ne estas digna de esperantistoj.*

A.- Nun venas Finnlando. Fraŭlino Olga Ihander en Pietarsaari, kiel multaj geaŭdantoj, informiĝis pri la aŭtomobila akcidento de mia edzo. Ŝi timis por lia bonfarto. Ni profitas danki pro tiuj multnombraj amikaj signoj.

Cl.- Por mi la Sankta Vendredo de nun estos ĉiam ligita al malagrabla memoraĵo. Dum mi atendis ĉe haltlinio, rapidega aŭtomobilisto forlasis sian normalan vojon por sin ĵeti kontraŭ la flankon de nia aŭtomobilo. Granda ŝoko. Mia aŭtomobilo estis renversita, kaj post kelkaj horoj mi kuŝis en lito por pluraj semajnoj kun cerboskuo. En tiu akcidento mia edzino riskis perdi sian tutan familion : gepatroj kaj gefratoj. Jen la modernaj riskoj.

A.- Ĉiam el Finnlando sinjoro Harii Laine en Nupuri ŝatis aŭdi nian citadon de la parolado de prezidanto Jonas.

Cl.- Ĉiam el Finnlando sinjoro Pekka Mäntyjärvi en Turku ŝatis nian pasintan leterkestan babiladon. Kiel multaj geaŭdantoj li ŝatus vidi niajn elsendojn plimultiĝi kaj plilongiĝi.

A.- Kiel ĉiam, nia respondo estas, ke la esperantistaro havas la radio-elsendojn, kiujn ĝi meritas. Kiam la esperantistoj multiĝos, ankaŭ samtempe multiĝos la radio-elsendoj, sed nur kondiĉe, ke la radio-elsendejoj estu informataj pri tiu aŭskultemo de la esperantistaro. Pro tio viaj vivsignoj estas utilaj al ni. Per ili ni scias, ĉu ni parolas en la dezerto aŭ ĉu ni prelegas por atentema publiko.

Cl.- Nun alvenis la vico de Francio. Dekvino da kongresanoj salutis el la urbo Epinal.

A.- Sinjoro B. Cheverry en Angers, kiu estas la prezidanto de la Esperantista Kultur-domo Kastelo Grésillon, sendis informojn pri la manifestacioj okazontaj tiun ĉi jaron. Ni havis la okazon mencii la kursojn de Grésillon inter la esperanto-manifestacioj.

Leterkesto, 2-a parto
Claude Gacond, 369-a radioprelego, 1970.11.04 & 07

Cl.- Nun ni atendas raporteton pri la okazintaj kursoj. Ofte ni ricevas petojn por anonci manifestaciojn. Poste malofte venas raportoj. Tiun kritikon ni antaŭ ĉio esprimas por ni mem. Vintron post vintro ni petis gazetojn kaj radio-elsendejojn informi pri niaj skiferioj en Adelboden. Sed vere malofte ni poste sendis raporton pri tiu sukcesinta manifestacio. De nun ni decidis agi iomete pli dankeme, kaj ni provos ne forgesi sendi raporton al la ricevintoj de niaj informpetoj.

A.- Alifoje ni ricevas raportojn, el kiuj ni malfacile ĉerpas ion interesan. Estas ke la raportantoj ankoraŭ tro subjektive raportas, anstataŭ raporti pri faktoj, ili parolas pri kongresa etoso. Kion ni atendas en tiuj densaj raportoj estas informoj pri la nombro de la partoprenintoj, pri la temoj de la prelegoj, pri la decidoj, pri la rezultoj.

Cl.- Ĉiam el Francio sinjoro Henri Coulon en Besançon skribas :

A.- *« Sen aldono de anteno al mia radioricevilo la aŭdebleco de esperanto-posttagmezaj elsendoj estas ja bonega. Sed tiu de la vesperaj, sufiĉe aĉa... Do mi petas vin sendi al mi la libreton, kiu klarigas kiel pliboni la aŭdpovon de mia ricevilo. »*

Cl.- Ni sendas al tiu aŭdanto okpaĝan broŝuron, kiu klarigas kiel mem konstrui taŭgan antenon. Tiu broŝuro, bedaŭrinde eldonita en nacilingvoj kaj ne en esperanto estos sendita al la personoj, kiuj esprimos la deziron ĝin ricevi. Antaŭaj ricevintoj jam esprimis sian kontentecon pri la pliboniĝo de la aŭdpovo. Sed la ondoj ne ĉiam moviĝas kiel oni ŝatus, ĉefe en la vesperaj horoj.

A.- Ĉiam en Francio ni salutas sinjoron Jacques Dony en La Ricamarie kaj sinjoron Lucien Duval en Arnouville-les-Gonesse.

Cl.- Al sinjorino Renata Géneau en Saintes, kiu deziras ricevi la unuan lecionon de la kurso, kiun ni programas por franclingvanoj kaj kiu informiĝas, por scii, ĉu tiu kurso jam estas registrita sur sonbendo, ni donos kelkajn informojn pri la nuna stato de nia laboro.

A.- Nia akcidento malpermesis finverki tiun kurson por tiu ĉi aŭtuno. Ĝis nun la redaktado estas nur provizora. Dank'al testoj ni kontrolas, ĉu la klarigoj estas sufiĉaj kaj sufiĉe klaraj por ke ĉiuj gelernantoj povu ĉion bone kompreni. Kiam ĉapitro montriĝas nebona, ni ĝin reverkos kaj poste ree testos.

Cl.- Tiel ni tutcerte donos al la estontaj gelernantoj kurson, kiu permesos pli facile memlerni ol nun. Ni ĉefe atentigas doni kompletajn klarigojn pri la vortfarado. Nur kiam ĉio estos preta, nur tiam ni pretigos diskon aŭ registros sonbendon por permesi al la gelernantoj aŭdi kiel esperanto estas prononcata.

A.- En Francio restas al ni por saluti sinjoro René Isnardon en Cannes, sinjorino E. Kohler en Besançon kaj gesinjoroj Gaston Turin en Pontarlier.

A.- La venontan semajnon ni daŭrigos nian babiladon kun niaj geaŭdantoj. Ni ricevis multajn aliajn leterojn el 9 aliaj landoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-